Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro

Elektita teksto por la 15a de decembro 2017

ESPERANTO KAJ DEMOKRATIO

VERDA MAJO

Pri « Verda Majo », Hasegawa Teru, japana aktivulino, bonvole legu en www.eo.wikipedia.org.

Bonvole konsideru, ke ŝi skribis tiun tekston en la jaro 1943.

« Kion vidis en Cara Rusio la juna sentema Zamenhof ? Avantaĝon de l'grandrusoj, subpremon al la aliaj nacioj, precipe la murdon de l'judoj, - kaj eble ankaŭ perfektan senrajtecon de l'popoloj inkluzive la grandrusan. Ĉu ĉi ĉio iel diferencas de l'agoj de l'germanaj kaj japanaj invadistoj ? En la koro de Zamenhof flamis furio kontraŭ la despotoj, buĉistoj, aspiro al la paciĝo, familiiĝo de l'tuta homaro. Li kreis Esperanton dezirante ke ĝi utilu por la egaleco kaj sendependeco de ĉiuj nacioj grandaj aŭ malgrandaj, fortaj aŭ malfortaj.

Do, denaske kaj nature Esperanto estas demokrata, antifaŝista, kvankam tiutempe oni ankoraŭ ne uzis tian esprimon. Sed, supozu : kiel kurba ĝi fariĝus, se dum la kreskado ĝi ne laŭirus la vojon demokratan ? Feliĉe, la saĝa kaj amoplena Zamenhof tre frue deklaris, ke li nur estas ĝia kreinto, li havas nenian rajton nek privilegion por ĝi, ĝi apartenas al la popolo ĝin uzanta, kaj ĝi evoluu inter ili.

Jes, Esperanto ne estas propraĵo de Zamenhof, sed de l'publiko. Oni ne bezonas nek devas blinde obei kaj alteniĝi al la vortaro kaj stilo. Esperanto ne estas rusa nek angla nek eŭropa, ĝi estas internacia. Tial ankaŭ ni orientaj esperantistoj havas rajton kaj devon aktive antaŭenpuŝi la movadon. Kaj efektive ni tion faris kaj estas farantaj. (...)

Esperanto estas tutece demokrata. Do la Hitleranoj konsekvence malamikas al ĝi. Post ilia pereo, nome post finiĝo de tiu ĉi milito la demokrata Esperanto en la demokrata mondo trovos sian bonan grundon kaj kreskos pli rapide kaj riĉe. Por tio tamen necesas nia konstanta pli pena laboro, ĉar neniu venko mem venas al ni. »

(El *Lernilo de Esperanto* n-ro 11-12 ; nov.-dec., 1943)

El la libro « Verkoj de Verda Majo » Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982